

II Jaro. XVII Num. 1918

Majo. — Madrido



ILUSTRITA REVUO MONATA
OFICIALA ORGANO DE «ZAMENHOFA KAJ ANDALUZIA FEDERACIOJ»



S-RO. ANGEL NOVEJARQUE

Nomata REĜO DE LA HIEROGLIFO

POST UNU JARO

Jam estas unu jaro de kiam ni perdis nian amatan Majstron, neniam sufiĉe plorata. Ni sendas per tiuj ĉi linioj tutkoran kondolencan al Lia respektinda familio, kaj inciton al ĉiuj esperantistoj por senlace laboradi kaj sukcesigi Liajn elpensojn kaj idealon.

Certe de la mondo de la geniuloj kaj bonfarantoj, nia neforgesebla Majstro rigardadas nin kun granda kontento, ĉar, kiel soldatoj kiuj deziras venĝi morton de sia generalo, ni energie, senlace laboradas kaj Esperanto reviviĝas en nia lando.

Gesamideanoj, ĉiam antaŭen!

Al Katalna Esperantista Federacio

Karaj gesamideanoj! Tre kontentaj ni, zamenhofanoj, salutas vin entuziasme pro la apero de via Bultemo kaj pro viaj decidoj reaktivigi esperantan laboron ĉie. Por ĉiuj estas laboro, por ĉiuj estas granda penado. Nia Majstro, neniam forgesota, postulas de la Eterneco nian kunagadon, senlaca, senĉesa «ĝis la bela sono de l'Homaro por eterna ben' efektiviĝos.» Ni esperas ke ni marŝu frate unu apud la alia, helpante unu la alian por triumfi Esperanton, nian celon solan.

Oni petas ke Manuskriptoj por la revuo estos kiel eble plej mallongaj kaj koncizaj.

KULPO MALKASITA

RAKONTO

—Ĉu ĉio estas preta? Mia kara Mario! Edzino kara!... Mia pakajeto, mia vojaĝkobrilo, mia pafilo... ĉu nenio mankas?

—Nenio, nenio mankas; ĉio ja estas preta. Kara Johano!—Respondis la edzino.

—Mi bone pasigos la tempon—diris la edzo—ĉar mi multe ŝatas ĉasi, sed vi ankaŭ ĝuos, ĉar vi manĝos perdrikojn kaj aliajn bongustajn ĉasaĵojn kiujn mi enkonportos ĉi tien.

—Tre bone; mia edzo. Vere mi bedaŭras vian foreston. Tamen la ĉasosporto estas saniga kaj plaĉas al vi...

—Adiaŭ, do, ĉar eble miajamikoj atendas min jam en la veturilo, kaj se mi malfruos ili ne multe atendos...

—Adiaŭ. Ke vi multe amuziĝu.

La edzo foriris, kaj la edzino restis iomete malgaja.

Ŝia patrino (sinjorino altkreska, dika, fortika, kun nigregriza liphareto kaj kelkaj izolitaj fortaj haroj en la mentono) ŝia patrino ne konsolis ŝin; kontraŭe, ŝi parolis kontraŭ la sportoj kiuj devigas foresti multajn horojn kaj eĉ kelkajn tagojn.

—Sed; patrino mia—diris Mario—tiu ĉi sporto estas tre saniga, kaj ĝuinte ĝin mia edzo revenas ĉiam kontenta, kontenta...

—Edzo nur devas esti kontenta apud sia edzino.

—Kaj li regalas nin per bona ĉasaĵo.

—Ĉu vi ne povas aĉeti ĝin? Vi estas riĉa.

—Vere, sed nenia ĉasaĵo estas al mi tiel bongusta kiel tiu kiun donacas al mi mia kara edzo.

—Via kara edzo! Fi! Li ne estas tiel bona kiel vi, pensas, naivulino!

—Patrino mia! Kial vi ĉiam parolas kontraŭ li? Bona, karecema li estas!

—Bone, bone; kreu tion, se vi volas.

Nur tri tagojn, laŭ diris Johano, li forestos; kaj du tagoj estis pasintaj kiam Mario, okaze, trovis en strato milkinon, kiu diris al ŝi:

—Ĉu vi scias tion kio okazis al mia edzo kaj al liaj amikoj?

—Ne. Kia okazis?

—Servisto venis avizi min ke la ĉasekskurso estos pli longedaŭra ol oni pensis.

—Ha! Ĉu vero? Kial?

—La pluvego de la lastaj tagoj difektis la vojetojn tra kiuj estas necese iri por supreniri la montaron, kaj pro tio la veturilo rompiĝis. Sed feliĉe ne okazis malagrablajo. Tamen por rebonigi la veturilon oni bezonas du tagojn. Post du tagoj, do, ili alvenos en la ĉasejon, kaj por ke la familioj ne estu maltrankvilaj pro la prokrasto, ili sendis serviston kiu rajde venis avizi.

—Stranga estas tio, ĉar la servisto ne venis al mi.

—Al vi!

—Jes; mia edzo partoprenas la ekskurson.

—Ha! Mi ne scias tion. Kaj vidu; dum du tagoj ili restos en malbona dometo, kie certe ne estas komforto nek bonaj manĝaĵoj. Imagu al vi...

Ne tre kontenta Mario revenis hejmen kaj rakontis al sia patrino tion kion la amikino sciigis al ŝi.

—Bone—ekkriis la patrino per basa voĉo—des pli bone; ili meritas pasigi malagrablajn tagojn. Por kio ili bezonas iri en montaron same kiel sovaĝuloj, kaj mortigi malfeliĉajn bestetojn? Kaj vidu; la servisto ne venis al ni. Via edzo eĉ ne rememoras pri vi.

—Ne; patrino. La servisto forgesis veni. Li estis devigata iri en multajn hejmojn...

—Nu, senkulpigu lin! Vi ĉiam estas indulga, ĉar vi estas naiva ĝis simpleco kaj malsaĝeco.

La sekvantan tagon matene Johano triumfe eniris sian hejmon kunportante grandan kvanton da ĉasaĵo.

—Bonan tagon!—li gaje kriis; —jam mi revenas, kaj mia ekskurso ne estis neutila.

—Johano!—ekkriis Mario—sed kiel vi povis reveni?

—Kiel! Kiel ĉiam. Kial ne?

—Sed nenio al vi okazis?

—Al mi! Kio nu povus okazi al mi?

—Tiam la veturilo ne rompiĝis? Tiam vi ne estis devigata atendi en kampa dometo? Tiam vi scias nenion pri tio kio okazis al viaj amikoj?

—Ha! La veturilo rompiĝis! Miaj amikoj estis devigataj...!

—Vidu—kriis furioze lia bopatrino—vidu la ĉasekskurson!... Bonega, bonega edzo li estas! Anstataŭ iri en ĉasejon, li iris pasigi kelkajn tagojn kun amantino. Kaj se tio ne estas vero, kien li iris? Kie li restis?

Tiam Mario kolere saltis sur sian edzon kaj ungogratias terure lian vizaĝon. La bopatrino per balailo frapis ankaŭ lin.

Li, premita en angulo, ne povis forkuri.

La bopatrino ĉion divenis efektive kiam li kredigis ke li iris ĉasi, li iris pasigi gajajn tagojn kune kun sia bela amantino. Poste li aĉetis ĉasaĵon kaj revenis hejmen konvinkita pri la sukceso de la trompo.

Sed ĉi tiun fojon la okazintaĵo malkaŝis lian kulpon.

Ambaŭ virinoj frapis lin senkompate, kaj li kriis kaj petis pardonon.

—Ne plu, ne plu!—li ekĝemis—mi pentas, mi konfesas ke mi malbone agis! Pardonu min, pardonu min! Mi plu ne iros ĉasi, mi certigas vin! Mi plu ne iros ĉasi!...

—Ne; certe ne! Vi plu ne iros!—kriis Mario—Vi plu ne iros; sed se vi volos de nove ĉasi... ĉasu hejme!...

Rafael de San Millán

Justeco kaj kompato

Larmoj de l'malriĉulo. trovu ĉe vi pli da kompato, sed ne pli da justeco, ol raportoĵ de l'riĉulo.

Penu eltrovi la veron tiel ĉe la proponoj kaj donacoj de l'riĉulo, kiel ĉe la ploroj kaj ĝenoj de l'malriĉulo.

... ne estas plibona la famo de severa juĝisto, ol tiu de indulga.

Kiam vi rompos la mezurilon de l'justeco, ke tio ne estu pro la pezo de l'donaco, sed pro tiu de l'kompato.

Kiam vi devas juĝi plodon de malamiko

ne atentu vian malamon sed la veron de l'okazintaĵo.

Via memestimo ne blindaĵo vin ĉe malpropra pledo, tial ke viaj eraroj ĉu estos neripareblaj, ĉu ripareblaj, ĉiam falos sur vian famon kaj eĉ sur vian monon.

Se la belulino petas justecon al vi, ne atentu siajn larmojn kaj ĝenojn, sed tion kion ŝi petas; tianmaniere siaj larmoj ne superakvos vian prudenton, nek siaj sopiroj vian bonecon.

Punoton ne insultu per vortoj, tial ke estas sufiĉe por la malfeliĉulo la suferon de l'puno sen la aldono de malĝentilaj frazoj.

Kulpulon, kiu estu sub via aŭtoritato, juĝu mizera homo, kun la kvalitoj de l'malvorta homa naturo, kaj ĉiom kio vi povos, kaj ne damaĝigos aliulon, estu kun li indulga kaj malsevera, ĉar, kvankam ĉiuj aliaj atributoj estas egalaj, pli brilas kaj reĝas laŭ mia opinio, la kompatato ol la justeco.

Cervantes

(El *Don Kihoto de l'Munĉujo* 2.^a parto, 42.^a ĉapitro).

Nia kunlaboranto Angel Novejarque

De antaŭ dudekkvin jaroj la ĝenia, sprita kaj famkonata Novejarque, tiu de la ŝaradoj, anagramoj, akrostikoj, hieroglifoj kaj ceteraj kriptografiaj spritludoj, sin dediĉas al ĉi tiu amuza arto; kunlaboranto de diversaj revuoj gravaj de Hispanujo, lia famo preferiris la Oceanon kaj aliris al Ameriko.

Je 1892, revuo el Madrido, titolata *La Gran Via*, kies direktoro estis la fama teatraŭtoro Felipe Pérez González, publikigis spritludojn kaj aperigis sur siaj paĝoj nomojn de la solvintoj. Novejarque decifris facile la amuzenigmojn kaj konsideris grandan sukceson vidi sian nomon inter aliaj. Ĉi tio kuragigis lin, kaj tuj, ankoraŭ knabo, sin decidis sendi al la revuo originalnan anagramon sian, kaj lia surprizo estis tre granda kiam li vidis ĝin sur paĝo de la revuo. Tiam li celis publikigi siajn amuzenigmojn sur

la jam tiam ŝatata semajna revuo ilustrita *Blanco y Negro*, kaj de la unua momento li tion atingis kaj komencis enspezi pro sia kunlaborado amuza. Ĝis tiam li estis ventumilpentristo.

Li kunlaboradas por diversaj revuoj kaj ĉiam li adaptas siajn spritludojn laŭ doktrinó aŭ karaktero de la revuoj. Li verkas en valencia dialekto, hispane kaj esperante, kaj atingis iujn premiojn pro esperantaj verkoj.

Lia famo estas tiel granda, ke oni nomas lin *Reĝo de la Hieroglifo*. Ofte li ricevas, kiel korespondantojn, anagramojn, akrostikojn, k. c., kaj inter la korespondantoj estas nekonato, kiu de tempo al tempo sendas al li akrostikojn aŭ aliajn divenotaĵojn pseŭdonime subskribitaj kaj sen adreso. Pro la skribaĵo ŝajnas ke la nekonato estas nekonatino. Siaj divenotaĵoj estas facilaj, diras Novejarque, por li kompreneble, sed montras grandan paciencon.


Ankoraŭ juna, 41-jara, li estas tre entuziasma esperantisto, senĉese laboranta por la triumfo de nia kara lingvo, kaj de ĉi tiuj paĝoj kaj tra ĉie lia genio kaj spriteco elradligos agrabligante iujn horojn al la legantoj.

J. M. R.

TUROJ DE SEVILLA

La Giralda.

Per tiu nomo estas konata la belega kaj gracia turo de la Katedralo, ĉar ĝi finas per granda statuo, kiu reprezentas la Fido, kaj tiu ĉi turniĝas kiel direktmontrilo de la vento. Oni opinias ke tiu turo apartenis al antikva araba preĝejo. Ĝian konstruon oni komencis la jaron 1184 kaj finis ĝin je 1195. Ĝia unua korpo estas alta je 69,66 metroj kaj ĝis la jaro 1396 ĝi finiĝis per kapitulo kovrita de emajlitaj brikoj, sur kiu ripozis supermetitaj unu sur la alia, de plej al malplej grandaj, kvar orumitaj sferoj, kiuj estis disbastitaj de uragano la 24-an de Aŭgusto de la dirita jaro. Dum la XVI jar-



LA TURO «GIRALDA» DE LA GARDENO DE LA ALKAZAR'O

cento, laŭ desegno kaj direktado de lerta arkitekturisto, Ferdinando Ruis, oni aldonis kvar korpojn; el kiuj la unua, kie estas la sonoriloj, estas sekvo de la primitiva, lerte ornamita. La dua, en kiu pendas la hora sonorilo, estas je dorika stilo, de kvadrata bazo kaj en ĝia friso oni legas la skribaĵon: *Turris-fortissima-Nomen-Domini* (La nomo de Sinjoro estas fortikega turo). Ĉiu el la kvar latinaj vortoj okupas unu fasado de tiu arkitektura korpo. La du sekvantaj korpoj estas rondaj; unu je jonia stilo kaj la alia korinta. La tuto estas kronata de belega kupolo sur kiu sidas la bronza bazo de la grandega statuo, ankaŭ bronza, de la Fido, pri kiu ni jam parolis, alta je 4 metroj kaj peza je 1.288 kilogramoj el kiuj 92 rilatas la palmbranĉo kiun tenas la statuo en ĝia dekstra mano kaj estas la ventdirektilo. La konstruo de tiuj kvar aldonitaj korpoj estis finata la jaron 1568. La turo estas, do, alta je 97,52 metroj. Oni povas tre facile supreniri, ĉar anstataŭ ŝtuparo ĝi havas 35 larĝajn deklivaĵojn, kiuj alvenas ĝis la sonorilejo. La jaron 1400, antaŭ reĝo Enriko III, oni lokis la sonorilhorloĝon, unu el la plej antikvaj konitaj en Hispanujo, sed en 1765 ĝin anstataŭis la nuna, belega maŝino laborita de religiano Jozefo Kordero. La arabaj ornamoj de la unua korpo de la turo, same kiel ĝiaj balkonoj, kapiteloj kaj ceteraj detaloj allogas la atenton de la kleraj turistoj, ĉar ili estas specimenoj de la plej ora epoko de la araba arkitekturo.

Turo de Sankta Marko.

Inter la maŭraj turoj de Sevilla, tiu de Sankta Marko estas unu el la plej rimarkindaj, post la nomata Giralda, se ni atentigas ĝian desegnon, ĝiajn graciajn proporciojn kaj delikatajn ornamaĵojn. Ĝi havis la saman celon inter la maŭroj, kiel havis *La Giralda*; ĝi estis tiu de la moskeo, kiu staris en la sama loko kiel la nuna preĝejo. Malbeligas ĝin ridinda sonorilejo surmetita tre poste kaj apogmureto kvazaŭ balustrado, kiu ĉirkaŭas la alta parto de la turo super

la araba friso, kaj anstataŭas la dentajn surturetojn, kiuj certe estis la finaĵo de la turo laŭ maŭra stilo.

Oni ne scias la daton, kiam tiu belega-turo estis konstruata, kvankam estas sendube ke ĝi apartenas al la plej arta epoko de la maŭraj sevillaj konstruaĵoj.

Ĝi estas je kvadrata bazo, tute fabrikita el brikoj. La kornico sin apogas sur romanikaj kapetoj, kredeble konstruitaj, kiam anstataŭis la unuan araban finaĵon la nuna apogmureto.

Domage, ke kiam oni faris la antaŭlonga renovigo de la turo, per kiu malaperigis kelkajn ridindajn malbelaĵojn, faritaj dum la lastaj jarcentoj, oni ne malaperigis ankaŭ la sonorilejon de la horloĝo kaj tiu apogbarilo kun la kornico kiu subtenas ĝin. Ambaŭ detaloj tre malbeligas tiel interesa monumento.

La friso kiu ornamas kaj ĉirkaŭas la turo konsistas el kolonetoj kiuj surportas arkarojn interplektitajn, tutĉe brike konstruitaj kaj de la plej bona araba stilo.

La kvar fasadoj de la turo estas traboritaj per belaj arabaj fenestroj sed ne ĉiuj je la sama alteco. Tiuj de la Okcidenta fasado, kiu estas la ĉefa, konsistas, la plej alta, el belega *adimezo* (araba balkono) konsistanta el du dentaj arkaĵoj, kiujn surportas marmora blanka koloneto kun kapitelo, la tuto enkadrigita je maŭra ornamaĵo nomita *arrabaa*. Sub tiu priskribita balkono estas alia konsistanta el du plierondaj arkaĵoj sur kies angulaĵoj oni elmontras malgrandajn pecojn da blankaj, nigraj kaj verdaj vitritaj brikoj kiel mozaiko; unua elmontraĵo, kiun ni konas pri apliko de tiu emajlado sur brikoj, kiu famigis tra ĉie sevillajn potfaristojn.

Sur la muro de la maldekstra navo de la preĝejo estas pordeto, enirejo de la turo. La ŝtupoj ĉirkaŭas spirale dikan centraĵon kaj alvenante kontraŭ ĉiu muro formas plataltaĵojn kies plafonojn ornamas belegaj diversaj arkaĵoj, kupoletoj k. t. p.

La sonorilo de la horloĝo estas unu el la plej gravaj de la urbo. Ĝi enhavas kurioz-

ajn reliefajn skribaĵojn, unu el kiu montr-
as la daton de ĝia fabrikado tiele latin-
lingve:

«S. P. Q. H. — BONO PUBLICO SUA PE-
CUNYA ANN, SALVATORI NRI, CHRIS-
TI 1553 FACIENDUM CURAVIT.»

Ankaŭ enhavas krucon sur kies brakoj
estas la antikva blazonŝildo de Sevilla.

Turo de l'Oro.

Tiu bela monumento staras sur la mal-
dekstra bordo de Guadalquiviro estis kons-
truata de la arkitekturisto araba Cid-abu-el
Ola, kaj de tiam, jaro 1220, estis nomata
Borg-aldsajeb (Ora turo), ĉar ĝi estis ornam-
ita de tre brilantaj emajlitaj kriketoj, kiuj
similis el oro, kiam la suno reflektis siajn
radiojn sur ili. Ĝis la jaro 1821, kiam estis
disbatita la muro, kiu komunikis la turon
kun la urba pordego nomita *de Jerez* (Ĥe-
reza) ĝi rekte estis komunikata ankaŭ kun
Alkazara fortikaĵo.

Sur bazo dekduangula ĝi levas sian unu-
an dikan korpon surturete kronita, sur kiu
alia gracia korpo pli altiĝas, kaj la tuto fin-
iĝas per gracia kupoeto vestita el emajl-
briketoj.

Tiu turo estas tre historia precipe dum
la tempo kiam loĝis en Sevilla Petro I de
Kastilla, ĉar en ĝi li gardis siajn ricajojn
kaj en ĝi loĝis Sinjorina Moŝto Aldonza Ko-
ronel dum 1338.

T. S.

Esperanto dum la milito

La germana registaro, rekonante ke ĝia
lingvo ne povas fariĝi universala, kion an-
kaŭ ne povas pretendi la angla nek la franca
nek iu ajn el la parolitaj lingvoj vivaj aŭ
klasikaj, alkuris al Esperanto. Neŭtrala
lingvo, kiu ne ofendas la naciajn sentojn,
por komunikigi kun la landoj de malsama
lingvo, kiel ekz: Svedujo, Norvegujo, Da-
nujo, Svisujo, Hispanujo, k. t. p.

La sama registaro ordonis publikigadi
en Esperanto ĉiujn oficialajn dokument-
ojn, kiuj rilatas la nunan milito, de la atenco
kontraŭ la Austria tronsekvanto ĉefdukto
Ferdinando, kies malfeliĉa morto estis laŭ
germana registaro, la kaŭzo de la militeks-
plodo.

Ankaŭ ĝi organizis servon ĉiutagan, per
bultenoj presitaj Esperante. Tiun ĉi fojon
ĝi estis la germana registaro kiu alkuris al
oficiala uzado de Esperanto, kiel neŭtrala
kaj internacia lingvo.

Baldaŭ, poste mi eksciis ke ankaŭ la
francoj, la angloj kaj la italoj komencis pu-
blikigadi siajn oficialajn raportojn pri mi-
lito en la lingvo del D-ro Zamenhof.

Kiel ni vidas, per tiuj ĉi ekzemploj nia
kara helpa lingvo Esperanto ĉiam progres-
as, malgraŭ la nunaj malfavoraj militcir-
konstancoj.

Vivu Esperanto!

Carlos Martínez

Sevilla, Aprilo 1918.^a

KONTRASTO


At la allestimataj Vendrell'aj gesamideanoj.

Silente la pluvo falas; ofte fulmo ŝiras
nubon, ĉion iluminas kaj tuj rompas la si-
lenton de la nokto terura tondro kies eĥo
de monto al monto perdiĝas ĉe la malprok-
simeco. La malvarmo intensa de tiu ĉi vintra
nokto restigas la urbanojn apud la fajro.
Neniu kuraĝas eliri el hejmo.


Tra la kristaloj de la balkono de mia
ĉambro mi rigardadas filozofe la faladon
de la akvo kaj la soleco de la strato pens-
igas min...

La naŭa batas en najbara turo, kaj en tiu
momento mem mi rimarkas du junajn trair-
antojn spite la pluvo kaj la malvarmo. Skuas
min deziro koni kialon, kiu elirigis ilin el
ilia hejmo, kaj mi scivolema ankaŭ eliras el
la mia kaj ilin sekvas.

Ili alvenas ĉe la pordo de Klubo kaj
iomete interparolas, unu el ili eniras en la



TURO DE L'ORO



TURO DE SAN MARCOS

Klubo kaj la alia daŭrigas sian iradon. Mi sekvas la lastan, kiu eniras en kafejo kaj post iom da tempo mi lin renkontas, li sidas kun aliaj multaj apud ludtablo sur kiu alia persono jetas kartojn apud kiuj la ĉeestantoj metas monon. Mia konato ŝajnas frenezulo, kun la okuloj kvazaŭ elsaltantaj el la okulkavaĵoj, tute nerva ĉar li elpoŝigas la monon ĉiam kaj ĉiam li perdas. Li diboĉis.

Tion vidinte, mi eliras kaj aliras al la klubo por renkonti la alian, kaj enirinte, mi renkontas lin ĉirkaŭata de junuloj al kiuj li alparolas kvazaŭ opostole, ĉe la templo de la kulturo. Kia kontrasto! Kaj pri kio li ilin alparolas? Ha! Jes, perfekte mi komprenas! Mi komprenas la entuziasmon de la aŭskultantoj, montrata sur iliaj vizaĝoj kaj de ilia atento. Li alparolas ilin pri «nova sento», kiun mi ankaŭ konas kaj amas; pri kunfratigado, kiu feliĝigos la homaron, kiam ĉiuj homoj parolos lingvon internacian kaj komprenos sin reciproke, detruante ĉiajn barojn interpopolajn. Li kuragigas ilin sekvi la vojon de Esperanto.

Reveninte hejmen, enprofundigita en priokupado pri tia kontrasto, mi ankaŭ min decidis alparoli al vi de la paĝoj de HISPANA ESPERANTISTO, al vi, portantoj de la kvinpinta stelo verda, emblemo de la plej bela idealo, pioniroj de la nova popolo, de la amo kaj paco inter ĉiuj la homoj, por vin kuragigi, por instigi vin daŭrigi la laboron komencita de D-ro Zamenhof, de nia kara, neforgesebla kaj senmorta Majstro. Ni abomenu ĉiajn diboĉojn, amegu Esperanton, ĝin disvastigu senlace ĝis ĝia triumfo, kiu estos ankaŭ nia, kaj estu nia batalkrio, krio de paco kaj amo: Viva Esperanto! Ĉiam antaŭen!

Francisco Guilart

Vendrell, Majo, 1918.

KRONIKO

Madrido.—«Zamenhofs Federacio» por plej bone honori la memoron de nia kara Majstro eldonis broŝuron, «Las Modernas

Humanidades», pritraktantan la Eksperimenton de Eccles. Ĉi tiu broŝuro disdonota al instruistoj, profesoroj, akademianoj, gravaj kaj influaj personoj ĉe la scienco, la belestritiko kaj la arto, interesigos ilin; plej bone se oni akompanus ŝlosilon. Per ĝi oni povas fari grandan kaj gravan propagandon. Centon po 5 pesetoj, kaj ankaŭ ni liveras centon da ŝlosiloj kun la fabelo *La Malbela Anasido* po 7,50 pesetoj.

Protektantaj Zamenhofanoj, kiuj ankoraŭ ne sendis siajn jarkotizaĵojn, estas potataj sendu ilin kiel eble plej baldaŭ.

Sevilla.—Dua Andaluza Regiona Kongreso Esperanta. Kun granda sukceso okazis tiu solenaĵo en Sevilla la pasintan 21-an de Aprilo, en la granda festsalono de la palaco, kie loĝas la Ekonomia Societo de Amikoj de la Lando.

Jam de kelkaj tagoj ekalvenis al Sevilla iuj tre konataj esperantistoj por ĉeesti en la kunsido; ekzemple, S-ro Gabrielo Alomar, prezidanto de la samideana Grupo de Palma de Mallorca, S-ro Rafael Fiol, militkuracisto de sanejo de Larache, S-ro J. Gamero, kolonelo-kuracisto de Madrido, S-ro Pokornij de Bohemujo, k. a.; sed ĝis la tago mem 21^a ne alvenis en la vagonaro de l'mateno la plej granda nombro da ĉeestantoj de tiu ĉi provinco kaj de Kordobo. Ili estis akceptataj de nia Sekretario S-ro Carlos Martínez ĉe la stacidomo, kaj kondukataj en nia tolsalono starigita antaŭ la granda promenejo de la foiro.

Tie atendis komisiio kun nia Prezidanto S-ro T. Soriano, kiu regalis la alvenintojn per lunĉo kaj ĉiuj gaje fratiĝis. Sekve ĉiuj iris en la Kongresejon, kie jam atendis grandnombro aliaj gesamideanoj, kiuj ankaŭ estis rogalataj kaj tuj ili trapasis en la salonegon, kie S-ro Soriano, akompanata de la Sekretarioj S-roj Martínez, Machuca, de la Sekretario de Kordoba Grupo, S-ro Serrano Olmo kaj de Kolonelo S-ro Gamero, malfermis la Kongreson per esperante saluta parolado. Tuj oni legis la protokolon de la unua Kongreso, kiu estis aprobata.

Poste oni legis salutegramon de Delegito de U. E. A. de Barcelono kaj salutparolado de S-ro Petro Naranjo je nomo de federacianoj de Jerez de la Frontera, kiuj estis aplaŭdataj.

Tuj la Prezidanto legis esperante raporton de la laboroj faritaj de la federacia Komitato kaj pri la progresado atingita en la Regiono. Li elmontris kaj precipe laŭdis la laboron de S-ro Naranjo en Jerez kaj de S-ro Rufo en la provinco Huelva, kie li klarigas diversajn kursojn de Esperanto kaj varbas multenombrajn samideanojn. Ankaŭ oni elmontris resumon laŭmonate de la financa stato de la Federacio kaj invitis komision por ekzameni detalajn elspezojn kaj kontrolilojn. La Kongreso post longa aplaŭdado aprobis la agadon de la Regiona Komitato kaj la kontojn de ĝi montritaj.


Enirante plene en la pritraktantaj aferoj de la tagordo, oni diskutis pri la urbo, kie debas loĝi la Regiona Komitato dum 1919, S-ro Serrano Olmo, per longa elokventa parolado eldirita Esperante, opiniis ke devas resti en Sevilla la sama Komitato, same kiel estu ankaŭ en Sevilla la urbo, kie oni okazigu la venontan trian Kongreson. Kelkaj kongresanoj respondis ke efektive ne devas esti rompita la starigitaj rilatoj kun multaj urbetoj kaj pro tio kaj aliaj motivoj la Regiona Komitato devas daŭrigi siajn laborojn en Sevilla; sed tiuj kaŭzoj ne ekzistas rilate la loko de la proksima Kongreso; kontraŭe, decas ke tiu solenaĵo efektiviĝu en diversaj urboj, ĉar ĝi ĉiam estas granda loka propagandilo. Nur estas esenca kondiĉo, ke la esperantistaro de la difinita urbo estu sufiĉe nombra kaj klera por inde prepari la detalojn de la Kongreso. Tial oni proponis ke estu Kordoba la urbo, kie estos kunvokata la Tria, la tagon, horon kaj en la ejo, kie la loka Grupo difinu.

S-ro Serrano Olmo respondis ke li je nomo de la kordobaj esperantistoj akceptas la proponon kaj tiel ĝi estis unuanime aprobata.

S-roj Bueno de San Juan de Aznalfarache, Alomar de Palma de Mallorca, Cimr de

Praha, Fiol de Larache, M. Garcia prezidanto de la granda asocio de komercistoj de Kordoba kaj aliaj, varme salutis la kongresanojn kaj esprimis siajn ideojn pri la traktitaj aferoj.

Ankaŭ S-ro Carneras, Regiona komitatano, proponis ke oni presu folion hispane kaj



LA TURO GIRALDA.

esperante redaktita, kiu entenu raporton de la Kongreso por disdoni ĝin vaste. Ĝi estis aprobata.

La Prezidanto proponis ke kiel inda fluaĵo de la Kongreso oni hore kantu la himnon L'Espero kaj tiel li fermis la Kongreson. Ĉiuj transiris en grandan salondon, kie, akompanata de fortepiano estis kantata nia himno, kaj post granda aplaŭdado kaj aklamoj la gefraŭloj dancis ĝis preskaŭ vespere.

En la esperantista budo de la foiro adiaŭis sin reciproke la samideanoj, kiuj dum la sama vespero forlasis Sevilla'on sur diversaj vagonaroj.

Tia estis, resume reportita, la 2.^a Regiona Andaluzia Kongreso.

Baracaldo.—La 15-an de Aprilo okazis en la ĉi tiea Grupejo nekrologia noktokunveno por rememorigi la unuan datrevenon de la morto de nia kara Majstro.

Antaŭ multe da gesamideanoj S-ro Lunate komencis tiel: Gesamideanoj: Ni kunigas hodiaŭ por rememorigi la unuan datrevenon de la morto de nia kara Majstro D-ro Zamenhof genia kreinto de Esperanto.

La pasinta jaro estis kruela por la esperantistaro. Post la granda perdo de nia Majstro, nia afero perdis ankaŭ la senlaca prezidanton de Brita Esperanto Asocio S-ro Mudie, kiu mortis sur la batalkampo en Francujo.

Subite, ankaŭ mortis la entuziasma prezidanto de Esperanta Akademio S-ro Boirac prezidinto de la unua Universala Kongreso okazinta en Boulogne-sur-Mer. Kune kun S-ro Bourlet mortinta antaŭ la milito, li multe propagandadis Esperanton en Francujo.

En niaj vicoj mankas la simpatia kaj kara amiko A. Huergo, kiu ankaŭ forlasis nin por eterne la 25-an de Novembro. Kaj kiom da esperantistoj eble mortis en la terura buĉado kiu frenezigas la nunan generacion!

Ili mortis korpe, sed ili ne mortis en nia memoro.

Mi petas al vi ke ni honoru ilian memor-

on starigu kaj ni esprimu nian respekton kaj nian saluton por ili!

Pöste; S-ro C. Garcia parolis la jenajn vortojn:

Antaŭ ĉio, mi sendas tutkoran kondolecon al la familio de la neforgesebla Majstro, al tiu familio kiu en Varsovio, de antaŭ unu jaro silente ploras la morton de la bona edzo, de la bona patro kaj de la plej granda bonfaranto de la homaro. Kaj ankaŭ mi sendas fratane saluton al la esperantistoj kiuj fervore disvastigas Esperanton, tial ke disvastigi Esperanton estas la plej bona monmento kiun oni povas starigi ĉe la homaj koroj je la honoro de D-ro Zamenhof.

Mi ne konas la lastajn vortojn de la Majstro, sed sendube ili estis por beni la esperantistajn pionirojn kiuj helpis lin por la propagando de Esperanto.

Mi kredas ke li ankaŭ pensis, ĉu la homoj disvastigos Esperanton tiel fervore kiel ili ĝin disvastigis ĝis la sama horo de lia morto. Al tio, mi respondas: Jes, karega kaj neforgesebla Majstro; via laboro estos daŭrigata de tiuj kiuj scias ke ĝi estas bel-ega idealo kaj ke per ĝi oni povas fari veran homaron.

Bedaŭrinde estas malmultaj homoj kiuj konas la taŭgecon de Esperanto sed ili klopodos por ke la ceteraj ĝin konos; kaj tiel, iom post iom, via deziro estos plenumita por ke vi pace ripozu en via nova loĝejo tial ke sufiĉege vi laboris dum via vivo.

Mi juras antaŭ via portreto disvastigi fervorege vian Idealon, tial ke ĝin mi sentas ĉe mia koro, kaj mia koro ordonas min daŭrigi la laboron komencitan de vi.

Kaj al vi, karaj geamikoj, aŭ pli bone gefratoj, mi invitas vin daŭrigi la laboron de la Majstro, tial ke ĝi estas la plej bona elpensajo por fari rondan familion. Kaj fari rondan familion estas la plej granda laboro, la plej sankta, kiu oni devas fari.

Ĉiam antaŭen! Ni sekvu tra la vojo kiun la Majstro montris al ni.

Longedaŭra aplaŭdado premis tiujn belajn vortojn.

Denove parolas S-ro Lunate por sciigi al la ĉeestantaro ke li legos paroladon skizante la vivon de nia kara Majstro.

Li skizis tre detale tiun suferigan vivon, kiel li diris: vivo maldolĉa en sia nuna parto kaj strange simila al tiu de multaj geniuloj kiel Cervantes kaj Sekpiro; poste pli feliĉa pro la atingita sukceso, sed en sia fino denove mallumigata de la homa milita frenezo kiu mortigis nian Majstron.

Li finis sian paroladon per la jenaj vortoj:

Granda estas nia ĉagreniĝo pro la perdo de nia karega Majstro, sed tamen ni ne forgesu ke la amo al lia memoro, al ni trudas la premantan devon unuanime kaj fidele, labori laŭ la vojo de li montrita.

Malfacilaj estas la kondiĉoj de nia agado, sed nepre ni devas esti suflĉe fortaj por batali kontraŭ la malfacilaĵoj de la nunaj tempoj.

Sur la nuna Esperantistaro kuŝas la sorto de nia afero. De nia fervoro kaj fideleco dependas la fakto, ke ĉi tiu kreita kun tiom da penoj, tra tiom da doloroj kaj malfacilaĵoj, estu konservata por la bono de la estonta homaro. Ni dissemi, ni laboru sen timo, kaj tiamaniere, estu certaj karaj amikoj, ke:

«Ni inter popoloj la murojn detruos,
kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.»

Barcelona.—La 20-an de Aprilo la grupo «Barcelona Stelo» okazigis nekrologia vesperfesto pro la nuna datreveno de la bedaŭrinda morto de nia plorata Majstro. S-roj M. Sorolla (Prezidanto), E. Rey, J. Serat, J. Graŭ kaj M. Solá pritraktis elokvente verkojn kaj vivon de D-ro Zamenhof. S-roj J. Iduarte kaj J. Graŭ, legis poeziojn senditaj de S-ro Viñals kaj Monfort.

La festo malgraŭ la malbona vetero estis solena.

La grupo «Paco kaj Amo» tre atente laboradas por nia kara idealo, ĝi aperigis Esperantia'n Bulteno'n por plej efiki labori por U. E. A. En ĉi tiuj momentoj kiam mal-

facilaĵoj baras ĉiajn entreprenojn por eldonataĵojn Pacamanoj kuraĝe eldonas okpaĝan bultenon kaj per ĝi elmontras sian fervorecon kaj sindonemon; ili konseie pripensas esperantan staton en nia nacio, kaj sin konvinkis kaj decidis plibonigi tiun staton. Jes, Hispanujo dank' al senlaciaj esperantistoj sin montros potence esperantigita je la fino de la kruelega buĉado tutmonda!

Vendrell.—La III-an de Esperanta Provinco-Tarragona Ligo okazos je la 9.^a de la proksima Junio en Valls.

Fervore laboras la samideanoj de Valls por atingi la plej bonan sukceson. En ĉi tiu urbo, S-ro Aguadé, prezidanto de «Nova Semo» el Reus, en la *Centro de Lectura*, faris gravan paroladon pri la temo «Neceso de Lingvo Internacia. Esperanto». La ĉeestantaro multenombra entuziasme aplaudis la parolinton.

La gazeto «Patria» aperigas interesajn artikolojn favorajn je Esperanto.

Zamenhofaj samideanoj, S-roj Piñol, Gorgues, Alsina kaj Mestres, membroj de la Grupo «Paco kaj Amo» de Barcelona vizitis nin kaj vigle parolis pri esperanta movado ĉe nia regiono kaj proksima Kongreso.—*Guitart.*

Sabadell.—La esperantistoj de ĉi tiu urbo entreprenis atingi de la urbestro la enkondukon de Esperanto en la publikaj lernejoj urbaj kaj estas grandaj esperoj pri la sukceso de tiu entrepeno, ĉar la broŝuro pri la *Experimento de Eccles*, eldonita de Zamenhofa Federacio konvinkos la urbestrojn pri utileco de Esperanto.

La komitato de «Aplech Esperanta Grupo» organizis solenan vesperfeston literaturan ĉe la «Centro Republicano Federal», okaze de novaj kursoj malfermotaj. Junaj geesperantistoj: F-inoj Comas, Miró kaj Montserrat, kaj S-roj Escapa, Boada, Iglesias, Comadrán kaj Campmajó, legis poeziojn, humorajojn, kaj aliajn esperantajn verkojn. S-roj Casas kaj Marcet paroladis elokvente. «Kvinteto

Emporium» ludis bonege gravan repertuaron kaj fine la *Esperon*. La 9-an de Aprilo okazis la malfermo de novaj kursoj kiujn ĉeestas 30 gelnantoj.—*Comadrán*.

Tarrasa.—La 28-an de Aprilo, la grupo «Lumon» okazigis feston je la honoro de la glora aŭtoro senmorta de Don Kihoto, Miguel de Cervantes. Ĉi tiu festo estis literatura kaj ĝin partoprenis gesocietanoj.

Dum Pasko estis organizata kaj okazigata ekskurso al najbaraj montaroj.

Ĉe la ĥora societo «Juventud Tarrasense», S-ro Chaler malfermis kaj klarigas du esperantajn kursojn: unu por infanoj 10-14 jaraĵ, ĉiutage; alia, alterne, por junuloj kaj virtoj. Ambaŭ kursoj sukcesas.



A N O N C E A K O

Senpaga por la membroj de Zamenhofa Federacio kaj ĝiaj protektantoj

Jesús Ramírez.—Strato Cabestreros, 10 kaj 12.—Madrid (Hispanujo), interŝanĝas poŝmarkojn.

José de Posse, Advokato.—Apartado, 125. Bilbao (Hispanujo), deziras interŝangi poŝmarkojn, precipe militpoŝmarkojn.

La gegrupanoj de la Grupo «Frateco» deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj. Adreso: Placo de Pí y Margall, 14. Vendrell (Hispanujo).

S-ro Benigno Luna interŝanĝos ilustritajn poŝkartojn kun fremduloj. Adreso: strato Luisa Fernanda, 18.—Madrid (Hispanujo).

S-ro José E. Pedraz el *Santander* (Hispanujo), strato Rua Menor, 32, deziras interŝanĝi pk., pm., esperantajn gazetojn kaj esperantajn afojn.

S-ro A. Tomás Iglesias el *Santander* (Hispanujo), strato Cervantes, 13, deziras interŝangi pk. kaj pm. Pri pm. li uzas katalogon Ivert & Tellier-1916.

Infanoj lernantaj Esperanton deziras korespondadi pk. kun kamaradetoj samnaciaj kaj alilandaj. Adreso: Esperanta kurso por infanoj-Sd. Coral «Juventud Tarrasense». *Tarrasa* (Hispanujo).

SPRITLUDOJ

de NOVEJARQUE

Rimarkigo.—En la solvo de Kriptografaj Numervortoj-esperantaj, aperinta en Aprilo mankas la vorto KVINTO.

SOLVOJ

DE LA PROVERBA KONSILLO

DE LA VORTLUDO

KI - UD - E - ZIR - ASLAF - I - LI - NON
 KI - S - UL - A - P - A - TRI ——— NON

KO ——— RO ——— LO

Kiu deziras la flinon, kisu la patrinon.

S-roj. P. Naranjo kaj J. Comella, el Jerez kaj Vich respektive, sendis ambaŭ solvojn.

		aj. (22)	por			vest	por		
La (1)	es	★	sin	ol	★	as	sin		
	at	ŜAKĈEVALA MOVLUDO						le	
ti	vi	★	mi	oj	★	or	pli		
		vest	rin			na	ce		

Komencante de la ĉelo 1.^a saltadu ŝakĉevale ĝis la 22.^a, tiamaniere ke rezultos PENSON pri virinoj.

La solvo en venonta numero.

ZAMENHOFA FEDERACIO

Ĉi tiu Federacio konsistas el Grupoj, Societoj kaj Esperantistoj el precizaj hispanaj regionoj, tamen povas aparteni al ĝi kiu ajn alia regionano eĉ fremdulo.

Ĝi celas unuigi Esperantistojn kaj progresigi Esperanton, kaj por tio starigis tri klasoj: *Zamenhofano*, *Protektanta Zamenhofano* kaj *Protektanto*, kiuj pagas respektive *unu*, *tri* kaj *kvar* pesetojn jare. La du lastaj klasoj ricevos ĝian oficialan organon,

Hispana Esperantisto

ILUSTRITA REVUO MONATA

Oni starigis la trian klason por la Grupoj, Societoj kaj Esperantistoj, kiuj, pro specialaj cirkonstancoj ne povas esti Zamenhofanoj.

Sendu la kotizaĵojn per poŝtmandato aŭ per respondkuponoj (4-12 kaj 16 respondkuponojn respektive).

Laŭ eble, Zamenhofanoj, protektantaj kaj Protektantoj ricevos senpage esperantaĵojn.

ADRESO: *Pasaje del Comercio, 8, Presejo. Madrid. (Hispanujo).*

ZAMENHOFA FEDERACIO povas liveri: argentajn verdstelojn, tre bone emajlitaj; PRI CERVANTES KAJ LIA FAMKONATA VERKO EL QUIJOTE; TRI RAKONTOJ KAJ KELKAJ VERSAĴOJ de D-ro Rafael de San Millán; TODO EL ESPERANTO, hispana ŝlosilo esperanta; PRAKTIKA TEMŝLOSILO POR ĈIUJ LANDOJ kaj HISPANA GRAMATIKO de *Julio Mangada Rosenörn*; propagandajn cirkulerojn kaj poŝtkartojn.

Oni akceptas ĉekojn kaj transpagilojn de Ĉekbanko Esperantista

Estas kolektoj plenaj de la jaro 1917

Ĉiu kiu sendos kvin pesetojn por helpi laboron de la Federacio ricevo tutplenan kolekton.

ADRESO: *S-ro. Julio Mangada Rosenörn.--San Bernardo, 96.
Madrid (Hispanujo)*